★
# TELOPEO
Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

***Volumo 59, Numero 5, novembro 2024***

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**

## Anonco: Zamenhof Tago 2024




La 15-an de decembro 2024 ĉe Esperanto Domo ni festos la Zamenhof-Tagon. La festo komenciĝos je la 12a (tagmezo). Programo:
- prelego pri Oomoto de nia gasto el Japanio, Masajuki Kobajaŝi
- prelego de nia gasto el Germanio, Rainer Kurz
- poezia legado: aŭstraliaj kaj NZ-poetoj en Esperanto (Kit Kelen)
- Mafia ludo en Esperanto, reguloj
- manĝado kaj Esperanto kuko…

Ĉiuj estas bonvenaj!

## Ŝakludtrofeo de Esperanto Domo
*Dmitry Lushnikov*

La 2-an de novembro okazis la 4-a ŝakludkonkurso por trofeo de Esperanto Domo. Ok ŝakludantoj partoprenis la konkurson. Du Esperantistoj inter ili: Thomas el Kanbero kaj John Grant el Sidnejo.
La trofeon gajnis Rebecca Browning el Germanio. Ŝi venis al Sidnejo por ferio kaj trovis informon pri la konkurso per Meetup.





## Naŭ semajnoj en Kanado

*Jonathan Cooper, prezidanto de EFNSK*

Inter la 14a de septembro kaj la 17a de novembro, mia edzino kaj mi vizitis Britan Kolumbion, Kanado. Estis nia 11a vizito, ĉar niaj du filinoj kaj nepino loĝas tie dum pli ol jardeko. Nia pli aĝa filino, kaj ŝiaj edzo kaj filino, havas grandan domon en bela urbeto nomita Cumberland [Ka'mbələnd], sur Vankuvera Insulo, do estis sufiĉa spaco por ni ambaŭ. Nia alia filino kaj ŝia koramiko loĝas en malgranda domo en proksima urbo, Courtenay [Ko'tni]. La tuta regiono nomiĝas la Valo Comox [Ko'moks].

Ambaŭ filinoj laboras plentempe, do oni eble supozas ke ni pasus la tempon sidante ĉehejme, trinkante multajn tasojn da teo. Tamen, la urbeto havis multon por okupi nin.

Je la komenco de 2021 (dum la pandemio), ni eksciis ke la preĝejo, kiun ni ofte vizitis dum antaŭaj vizitoj, havas novan pastorinon, kaj fakte novajn eklezianojn, kaj ke la diservoj okazis per Zoom dum la pastorino gvidis ilin en la preĝejo. Ni decidis aliĝi, ĉefe por ke ni povu denove vidi la internon de tiu bela preĝejo. Ni ne anticipis kiom multe ni ĝuos la diservojn: ni renkontis multajn tre afablajn homojn, kaj la etoso de la eklezio estis – kaj estas – tre bonvenema kaj akceptema. Do, ni iĝis lojalaj ĉeestantoj/membroj. En la mezo de 2022, ni vojaĝis al Kanado kaj finfine fizike vizitis la eklezion kaj renkontis la eklezianojn. Estis mirinda, kurioza sperto.

La nova eklezio havas interesan nomon: "Weird Church" (Kurioza Eklezio). Mi ne certas kial ĝi tiel nomiĝas, sed eble estas ĉar estas iom "kurioze" trovi kristanan eklezion kiu akceptas ĉiujn, sendepende de seksa orientiĝo, seksa identeco, religia kredo, ktp. Krom la ĉiusemajnaj diservoj, okazis: ĉiusemajnaj meditadoj, arbaraj vagadoj, lernsesioj pri kantado, kaj eĉ filmprojekciadoj.

Krom la eklezio, okazis en la urbeto multaj diversaj kulturaj, artaj kaj sciencaj eventoj, kiujn ni partoprenis, inkluzive de:

- Desegnogrupo
- Komunuma koruso
- "Fungus Fest", festivalo pri sovaĝaj fungoj, inkluzive de prelegoj kaj festeno
- Lanĉfestoj por du lokaj komunumaj magazinoj
- "Woodstove Festival", granda semajnfina festivalo de muziko kaj arto

Ni kaj niaj familianoj ankaŭ vizitis malgrandan proksiman insulon, Insulo Hornby [Ho'rnbi], kie ni faris arbarajn vagadojn kaj vizitis grandan parkon de fama kanada skulptisto, Jeffrey Rubinoff.

Ĉu mi faris ion Esperanto-rilatan? Nu, mi ne trovis esperantistojn en Cumberland aŭ la ĉirkaŭa regiono, tamen mi sukcesis pri du aferoj:

Mi partoprenis kunvenon de la Esperanto-klubo de Viktorio (la ĉefurbo de Brita Kolumbio, proksimume tri horojn suden) per Zoom. (Ĝi okazas je 09:00, kiu estas 04:00 en NSK, do nur taŭgas por mi kiam mi estas en la sama horzono!)

Ekster la preĝejo de Weird Church estas "pacostango": ligna stango kun la vortoj "May peace prevail on Earth" en kvar lingvoj, inkluzive de Esperanto! (Supozeble, tio estis elektita ĉar ĝi estas la "lingvo de paco".)







Pacostango antaŭ kaj post refarbado. Rimarku la malgrandan verdan stelon.

Bedaŭrinde, post kelkaj jardekoj, la vortoj fariĝis tre malfacile legeblaj pro paliĝanta farbo. Do, mi volontulis refarbi ĝin. (Vidu la fotojn.)

Se iu el vi decidos viziti Kanadon, mi forte rekomendas Vankuveran Insulon, kaj ne nur la sudan parton (ĉirkaŭ Viktorio). Prenu la tempon por vizitu la Valon Comox.

Fine, mi volas danki miajn kolegojn en la estraroj de kaj Esperanto NSW kaj AEA, ĉar ili konsentis ŝanĝi la kunventempojn por taŭgigi ilin por mi.




La preĝejo de Weird Church, montrante la lokon de la pacostango. Rimarku la daton de la konstruaĵo; ĝi estas nur unu jaron pli juna ol Esperanto! (La signo montras la *originalan* nomon de la preĝejo: "Cumberland United Church".)

EFNSW: Esperanto Domo
Kontaktu Jonathan Cooper: 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Joanne Cho |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |
| Estraranoj: | Dmitry Luŝnikov, Terry Manley, Greg Cooper, Mark Rodowicz |

